

Avanco



Oficiale organo de Kuba Esperanto-Asocio

1990/2

Sendinto:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 2018
10200 Havano
Kubo



Al:

Esperantistoj kaj Gekongresontoj
Strato Mondo, n-ro 75
1990-UNIVERSO

PAR AVION
LUFPOST
AIR MAIL





havano, la 1an de junio, 1990 • n-ro 2/90 • aperas kvarfoje jare • eldonas kuba esperanto-asocio, pf. 2018, 10200 havano, kubo. telefono: 62-7704 • ĉefredaktorino maritza gutiérrez • redaktoroj orlando raola, alberto fernández-calienes, alexis otero • pliaj kunlaborantoj serĉataj • prezo de unu ekzemplero enlande: cup 0.50, eksterlande: nig 2.00 aŭ 2 irk, pagendaj al nia konto ĉe uea keax-u.

enhavo

Maritza Gutiérrez

Veroj kaj esperoj

3

literature

Nicolás Guillén: Kuba nacia poeto

4

kultura panoramo

Orlando Raola

Ni okupiĝas pri E-kulturo... pri kio do?

5-7

havano kongrese

La 75a UK: noticoj, raportoj

8-9

juna ondo

Alexis Otero

Definitive FAKTOJ, sed...

13

amuziĝui

Krucenigmo

14-15

kontaktojn serĉas

Korespondpetoj kaj anoncoj diversaj

16

estimataj,

Ofte rezultoj ne kontentigas nin; plejofte ni konsideras ion ne esitara, tamen iel efika; nur tiel vi povus pardoni niajn fuŝojn en la unua ĉi-jara numero de **Avanco**. Ĉi-foje nia laboro pli kongruas kun niaj intencoj kaj espereble ĉiu paĝo nun oferata al vi portu la necesan kaj ĝojigan emocion de bonvola kaj streĉa agado niaflanka. Akceptu tiun ĉi duan numeron kaj pripensu plej bonan manieron, ĉu plibonigi, ĉu ĉiesigi ĝin. Jen nia invito: plej ĝuu la rezulton!

La redaktorino

Veroj kaj esperoj

Maritza Gutiérrez

Dum fojaj pripensoj rilate la agadon de la Esperanto-movado nialande, mi taksas ĝin kiel efika, ĉar la rezultoj plej evidentiĝas tion; tamen neniel tiu aserto konsistigas absoluton. Ja estas fakto, ke ni okazigos Universalan Kongreson venont-julie, kio cetere estas prioritato en nia taskaro nuntempa.

En tiu ĉi revuo vi trovos informojn pri la kongresaj preparoj tre bone evoluantaj. Miaj pripensoj pli ofte iras al nunaj postuloj en la asocia laboro, kiuj pli klare prezentigis post la kongreso. Tiusence ni povas rimarki alpaŝojn, ekzemple, iom premitaj de la kongreso mem ni definitive decidis renversi la instrusistemon en niaj lernejoj, unue kiel eksperimenta fazo en la ĉefurbo; tio konsistas en plia emfazo je lingva komunikeco, t.e. ne nur instrui la lingvon, sed samtempe igi ĝin io necesa por interhoma komunikado, ke la lernanto paralele sci-u-konsci-u pri la utileco de la lingvo kiel ilo por esprimi siajn pensojn kaj ricevi similajn reagojn flanke sia interparolanto, kio ja estas interkomprenigo.

Dum pluraj jaroj niaj rezultoj ĉi-fake estis bonaj, nekontesteblaj; tamen analizante ilin sub novaj demandoj montriĝas kiel partaj atingoj, ĉar vera kompletigo okazas nur kiam la lernanto kapablas esprimi sin flue kaj klare, ne nur korekte, kio devas okazi ekde la komencaj tagoj surbaze de la lernitaj elementoj. Ĝi estas laboro jam entreprenita, kies rezultoj ankoraŭ ne takseblas. Sed tio estas nur flanko de miaj prizorgoj, kiuj logike estas mem zorgoj de la Asocio.

Aliflanke ni serĉas kaj bezonas instigi niajn movadanojn plibonigi nian struk-

turon kiel asocio; kio jam eniras la fakon Organizo. Dum la lastaj jaroj ni alku-timigiĝis lami pri tiu laboro, kaj fakte ne plu eblas kontentige labori, ĉar alikaze ni mallaborus. Kiel aranĝi solvon taŭgan al tio? Nu, estas ĉies tasko! Provizore ni proponom ordigi niajn metodojn dum la kongreso forprenas preskaŭ ĉiujn horojn de nia tempo. Kampanjo por akurata kotizo de asocioj ĉiam restas en nia labor-linio kaj, espereble la esperantistoj tut-lande vigle reagos. La kongreso estos kvazaŭ vera elprovo pri maturiĝo de KEA, kaj post ĝi multaj homoj silente, sed atente observos nin. Tiam montriĝos ege necesa nia forto estigonta el nia kapablo memorganizigi, kio ja pligravigos nian rangon en la socio. Ni travivas unikan epokon de la landa Esperanto-movado en Kubo, kaj el niaj spertoj kaj saĝeco venos fruktoj. Prave niaj posteuloj plenrajtos malpardoni nian agadon se el ĝi ne fontos solida estonteco. Ni ja estas grava parto de la movada historio en Kubo. Alperfek-tiĝo estas esenca devo de nia vivo. Ni kune alstrebu ĝin! Homaj rimedoj ekzistas; nu, ni agu!



75a UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO

Unu el la plej grandaj poetoj de la hispana lingvo kaj Nacia Poeto de Kubo, Nicolás Guillén lasis al la posteuloj impresagan verkaron, ankoraŭ ne sufiĉe konatan ekster la limoj de tiu ĉi geografia regiono. Ni profitu la okazon uzi Esperanton pontolingve por pliebligi ĝian nepran diskonigon. Ĉi-sube vi trovos la mejloŝtonon de la Guillén-a poemaro. Temas pri Tengo (Havas mi), ankoraŭ nomo de unu el liaj libroj. Same, ni invitas niajn legantojn kontribui aliajn erojn tradukitajn aŭ originalajn al riĉigo de tiu ĉi rubriko. Dankoni!

Kiam mi rigardas min kaj tuŝas min
Mi, eĉ hieraŭ mem Johan' Neniohav'
kaj nun Johan' Plenpoŝt'
kaj nun ĉiohava
mi turnas mian vizaĝon, mi rigardas
mi rigardas min kaj tuŝas min
kaj sindemandas kiel eblis ĉio ĉi.

Havas mi, ni vidu,
havas mi la plezuron trairi mian landon
mastrante ĉion en ĝi
rigardante de tre proksime kion antaŭe
mi nek havis nek povis havi mi
Zafron, mi povas diri
monton, mi povas diri
urbon mi povas diri
armeon diri
jam miaj por ĉiam, kaj viaj, niaj
kaj larĝan rebrilon
de fulmo, stelo kaj flor'.

Havas mi, ni vidu
havas mi la plezuron iri,
mi kamparano, laboristo, simplulo,
havas mi la plezurĉion iri,
(por ekzemplo)
al banko kaj alparoli la estron
ne angle
ne sinjore
sed kiel endas hispanlingve nomi lin
kamarad'.

Havas mi, ni vidu
ke estante negro
neniu min povas haltigi
ĉe la pordo de dancejo aŭ kabared'
nek jen ĉe la akceptejo de hotel'

kriante al mi ne estas ĉambro
minimuma ĉambro kaj ne ĉambreg'
kolosa
ĉambro malgranda kie mi ripozu iom
senĝen'

Havas mi, ni vidu,
ke ne estas kampargvardio
por min preni kaj ŝeti enen de kazern'
nek por min deŝiri kaj peli for de mia
terpec'
al la mezo de la ĉiesa vojstrek'.

Havas mi, ĉar mi havas la teron, la maron
havas mi
ne country
ne high life
ne teniso nek jaŝit'
sed de plaĝo al plaĝ' kaj de ondo al ond'
blua giganto, malferma, demokrata
finfine, l'mar'.

Havas mi, ni vidu,
ke jam mi lernis legi,
nombri
havas mi, ke jam mi lernis skribi
kaj pensi
kaj ridi.

Havas mi, mi havas lokon por labori
por gajni
kion indas havi por manĝad'.

Havas mi, ni vidu
havas mi ĉion kio estu nepre mia havaĵ'.

Elhispanigis: O. Raola

Orlando Raola González

Saluton, geamikoj! Jen la duan fojon KP sur la paĝoj de Avanco. Malgraŭ tio, ke ni ne havis tre amasan reeĥon post la apero de la unua, tamen ni rajtas supozii, ke la rubriko iel-aliel plaĉis kaj utilis al la legintoj.

Ci numere vi trovos malgrandan ŝanĝon en la enhavo. Ni decidis grupigi librorecenzojn en memstaran rubrikon, pri kiu zorgis Maritza. La ceteron daŭre vi trovos ĉi tie: komentariojn, sciindaĵojn, konsilojn, fragmentojn verkitaĵn de elstaruloj ktp. Do, ne forgesu sciigi al ni viajn impresojn pri la tuj legota KP: kio mankas (aŭ malmankas), ĉu pli longe aŭ eĉ pli funde..., ankaŭ vi povas proponi temojn kaj levi demandojn ĉiaspecajn, tio ege helpos nin!

Leteroj tre bonvenas, sed ne hezitu utiligi ajnan alian komunikilon por kontakti

Vian plej amikan redaktoron

NI OKUPIĜAS PRI ESPERANTO-KULTURO... PRI KIO DO?

Cu vi ŝatas difinojn? Fakte, ne temas pri triviala demando. Ĉiajn homojn oni trovas sub la suno. Estas tiuj, kiuj ŝatas ĉion fiksi kaj difini. Por aliaj, estas multe pli facile kompreni la ĝeneralizaĵojn iom intuicie, do, ne emas al difinado.

Moderna psikologio klopodas klarigi pri tiuj du manieroj percepti kaj koncepti la mondon respondecas opa cerba duonsfero: la maldekstra pri ekzakteco, la dekstra pri revoj. Filozofojn kaj scienculojn oni plej probable trovas en la unua grupo, poetojn kaj artistojn en la dua; dum la ceteraj homoj troviĝas diversgrade meze, pli proksimaj al unu aŭ al alia ekstremo.

Sed, bone, mi volis enkonduki la temon pri difinoj, ĉar malgraŭ ĉiaj konstruaĵaroj, malgraŭ la malfacilaĵoj, kiujn trovas la poeziemaj, estas nekontestebla fakto, ke difinoj povas esti utilaj, ĉar ili resume kaj precize klarigas signifon, fiksas la karakterizojn de io, permesas bildigi bazajn trajtojn de io ajn homa konero.

Ĉar nia nuna okupiĝo estas Esperanto-

kulturo, ni alstrebu difini ĝin: Ni diru, pri kio do temas nia afero. Unue ni konsciu, ke ne eblas pretendi originalecon tiurilate; ja ĉiuj kiuj ĝis nun okupiĝis pri tiu temo, pli malpli frue ellaboris kaj diskonigis ian difinon. Espereble, ni dividus kun ili la celojn: ni ellaboru nian difinon por plifaciligi la komprenon pri niaj veraj celoj, precipe al tiuj plej foraj de nia interna rondo.

La starpunkton mi proponas el eseo publikigita en 1983 far la konata pola Esperantisto-sociologo Jerzy Leyk.

Laŭ li, la kulturo de difinita socigrupo, niakaze la Esperantistaro, estas la "tuto de pensokreaĵoj, aktivadoj, valoroj, rekonitaj kaj akceptitaj far la koncerna socigrupo kondukmanieroj, rekonitaj kaj fiksitaj artaj verkoj, kiuj estas heredataj per sekvaj generacioj kaj transmissiataj al aliaj sociaj kolektivoj".

Inter la elementoj kiuj konsitigas la Esperanto-kulturon, ni povas distingi tri ĉefajn tipojn. Laŭ la citata aŭtoro ili estas:

- rekonitaj kaj komune enradikiĝintaj kondukmanieroj, determinantaj la kondutojn agnoskatajn kiel validaj; ekz. decreguloj, kunvivprincipoj, kriterioj de moralaj kaj etikaj prijuĝoj, sintenoj rilate la neanojn de la komu-

numo kaj cetero.

- komunaj valoroj, kiel ekz. la flago, stelo, himnoj, kanzonoj kaj kongresoj, la sinteno al la lingvo, certaj verkoj de fundamenta signifo (ekz. *Fundamento de Esperanto*, *Plena Vortaro*, *Plena Ilustrita Vortaro*, *Plena Analiza Gramatiko k.s.*), mitoj, de vizoj, sloganoj ktp.
- verkado, en la E-komunumo limigita nur al lingva kreado (Esperantlingva kulturo). Al ĝi apartenas literaturo originala, traduka, gazetaro (de kontinua, plurlara apero), programoj de konstantaj radiostacioj, teatraj kaj muzikaj prezentoj de Esperantaj verkoj.

La elementlisto estas sufiĉe ampleksa kaj tre trafe elstarigas la diversajn flankojn de nia kultura agado.

Ĝi taŭgos por helpi al ni kompreni kiom multe ni dividas kun niaj samkomunumanoj mondscale, kio estas plej valora en nia kolektiva trezoro. La Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj devas ĉiam memori pri ĝi, ĉar fine ili rolas la transdonantojn de niaj kulturaj valoroj (bedaŭrinde ne ĉiam plenkonscie, tamen tiel devus esti).

Kaj nun, kara amiko, post konatiĝo kun la difino kaj la elementoj, bonvolu prianalizi ĝis kiu grado via loka Esperanto-organizo serioze alfrontas la laboron rilate disvastigo kaj pliriĉigo de tiu unika kulturo nia, pripensu ankaŭ kiom da tempo vi persone dediĉas al tiuj aferoj kiuj tute ne devas resti nur zorgo de ia kultura elito, sed de la tuta lingvano. Se post konstanta legado de KP en Avanco vekigis en vi latentia emo al ĉio ĉi, aŭ simple vi pli konscie zorgos pri via persona kaj grupa kontribuo al tiu tutmonda kulturfluo, mi vere havas la plej altvaloran rekompencon.

EKKONU LA REVUON LATINAMERIKA MEMUARO

Fojfoje oni aŭskultas la plendon, ke en Esperantio tro multas la revuoj, sed ke konsiderinda parto el ili ne estas sufiĉe bonkvalitaj kaj eĉ ne indaj je presado. Malgraŭ tio, ke tiu ĉi argumento pravas, estas bedaŭrinda fakto, ke la eksterstarantoj emas tro facilanime juĝi laŭ la ekstera bildo de niaj publikigaĵoj. Kaj okazas, ke jen ni trovas eldonaĵon tre modestan, sed enhavoriĉan, aŭtentike valoran.

Grupo de esperantistoj fondis antaŭ kelkaj jaroj Latinamerikan Per-esperantan Kulturcentron (LAPEK) en urbo Armenio, meze de la kolombiaj Andoj kun la celo pliiĝi la kulturalan intersanĝon inter Latinameriko kaj la mondo pere de la internacia lingvo. Tiuĉele, la ĉefa agado de LAPEK estas eldonado de hispanlingva revuo *Sonorilo*, kie aperas tradukoj el diversaj Esperantlingvaj libroj kaj revuoj kaj la Esperanta revuo *Latinamerika Memuaro*, kiun mi deziras prezenti al vi hodiaŭ.



ISSN 0121-0013
**Latinamerika
Memuaro**

Por esperantigi nian kulturon kaj kulturigi nian Esperanton

Temas pri kvarmonata informilo dudekpaĝa, formato A5, kiun redaktas samideano Carlos A. Castrillón, kunlabore kun Idalia Cardona kaj Jorge I. García. La unua numero aperis 1987.09 kaj ili havas tre signifoplenan devizon: Por Esperantigi nian kulturon kaj kulturigi nian Esperanton. Tre zorgeme ilustrita per desegnaĵoj, kaj ve, preskaŭ absolute

manka je preseraroj!

Elstaran lokon trovas en tiu ĉi alloga revueto: poezio, ambaŭ originala kaj traduka. Ekzemple, la lasta numero kiu atingis nin (numero 6, 1989) ofertas abundan kolekton de hajkoj kaj tankaĵoj, mallongaj poemetoj japandevenaj. Ilin verkis unu el la plej elstaraj figuroj de hispanlingva beletro, la argentinano Jorge Luis Borges, kunĉ kun aliaj poemoj originalaj de Ralph Dumain kaj de la redaktoro Castrillón. Infirmoj, spritaĵoj, eseetoj kompletigas la delikatan bukedon trionjara.

Nu, se vi deziras kunlabori aŭ simple rekte konatiĝi kun Latinamerika Memuaro, skribu al ili al Apartado Aéreo 528, Armenia (Q), Kolombio.

Dume, klopodu kontakti la Esperanto-redakcion de Radio Havano Kubo, kie vi trovos bonan kolekton de Latinamerika Memuaro je via dispono. Nepre antaŭsiĝu vian viziton telefone (7-4956, branĉo 32)

EL "KULTURO KAJ INTERNACIA LINGVO" DE WILLIAM AULD

Lingvoposedo varias de persono al persono. Plej dotitaj estas tiuj, kiuj scias trafe uzi ĉiujn tri jam priskribitajn gradojn aŭ kategoriojn. Necesas emfazi, ke tio tute ne estas afero klasa; ekzistas profesoroj, kiuj sin esprimas plumpe, banale aŭ malprecize, kaj ekzistas simplaj laboristoj, kiuj spicas sian ĉiutagan lingvaĵon sprite, kolorplene, eble eĉ poezie. Lingvouzado estas talento, kiun posedas la homoj tre diversgame.

Sed kiel ĉiuj talentoj ĝi estas edukebla. Miaj nunaj komentoj pritraktas antaŭ ĉio la lingvaĵon artan; sed ĝiaj principoj estas aplikeblaj je ĉiu stupo de la lingvouzado. Ĉu ne estas dezirinde, ke eĉ en nia ĉiutaga Esperanto ni esprimu niajn pensojn ne nur klare kaj trafe, sed ankaŭ, se eble, elegante? En ĉiu momento ni havas vastan elekton inter disponeblaj rimedoj

lingvaj. La plej simplan frazon ni povas formi aŭ bele aŭ malbele. Kvankam pli gravas la enhavo de la penso, tamen se oni komunikas tiun enhavon freŝe kaj elegante, tio plifortigas la impreson ricevatan de la aŭskultanto aŭ leganto.

Tio klare estas demando estetika.

SUBTILECO DE LA VORTORDO

Homoj posedantaj lingvon kun relative rigida vortordo ne ĉiam komprenas la avantaĝojn de vortordo relative libera. Efektive ili ne malofte supozas la ekziston de ia "natura" vortordo (kiu spegulas, kompreneble la vortordon kutiman en ilia propra etna lingvo), sed kiel eksplikis Wells, tio estas iluzio. Iu lingvo havas rimedon de subtileco kaj eleganteco (kiel ekzemple en la klasikaj latina kaj greka). Ju pli libera estas la vortordo, des pli da rimedoj ekzistas; kaj vere Esperanto havas grandan liberecon tiurilate. Tio devenas parte de ĝia noveco — ĝi ankoraŭ ne havis tempon sufiĉan por ŝtoniĝi — kaj parte de la tutmondeco de ĝiaj uzantoj, kiuj kutimiĝis al la diversaj vortordoj de siaj etnaj lingvoj.

Pro tio mi asertas, ke la libereca vortordo de Esperanto estas unu el ĝiaj gravaj avantaĝoj kiel lingvo internacia, kaj tute precipe, cetere, kiel traduklingvo (pro la multnombraj eblecoj ĉiam prezentataj al la tradukanto). Elektro de la plej bona kaj trafa estas afero de *bongusto*, kiu malgraŭ opinidiferencoj en lingvotaksado estas konstatebla kaj eĉ mezurebla fenomeno. Grandaj verkistoj estas plej ofte tiuj, kiuj algrade posedas lingvan bonguston. La maloftajn esceptojn oni pardonas pro iu alia faktoro, ekzemple, graveco de la enhavo; sed ilin oni ja pardonas, kvazaŭ pro iu manko aŭ peko.

Kaj jen mi adiaŭas, ĝis la venonta panoramo, mia kaj via, komplice-malmalice, ĉu?

Lasta kontrolvizito de KKS

La pasintan 7an de aprilo finis sian kontrolviziton al la kongresurbo — laŭ la kongresa regularo kaj la organizaj postuloj — s-ro Nikola Rašić, konstanta kongresa sekretario de UEA — pli mal-longe KKS —.

Dum la septaga restado en Havano konkretiĝis pluraj detaloj en kunsidoj kun Cubana, oficiala transportisto, Cubatur, vojaĝagentejo kaj la Kongresa Palaco, kongresejo. Okazis kunsidoj kun pluraj aliaj ŝtataj instancoj kaj laŭkutime ĉiutage organiziĝis kunsidoj kun LKK-anoj.

La vizito — kvankam por unuafojaj organizantoj de UK estas ĉiam tro mallonga — povas ricevi kvalifikon de utiliga.

Tiu ĉi vizito de KKS havis ankaŭ sian ekstermovadan reĉion. S-ro Rašić interviŝis de RHK kaj partoprenis gazetaran konferencon en la sidejo de la Unuiĝo de Kubaj Ĵurnalistoj kiu rezultigis artikolon en la prestiĝa ĉiutaga ĵurnalo *Granma*.

Unuafojaj kongresanoj

Jen ni ĉiuj. Precize por tiaj esperantis-toj, ĉu novaj, ĉu jam verdaj, sed neniam antaŭe spertintaj la unikecon de la unuaŝalaj Kongresoj de Esperanto estas planata tiu renkontiĝo kiu okazos en salono *Privat* la 14an de julio de 17:00 ĝis 18:00 horo. Tie ni certe ricevos tre utilajn konsilojn de jam spertaj kongresanoj.

La UKoj jam havas sian tradicion, — konsciu ke ni organizas la 75an — kaj ili funkcias laŭ tiaj normoj, ke certe bezonatas kelkaj konsiloj:

- kubaj kongresanoj ricevos sian kongresan libron eble semajnon antaŭ la UK. Ĝi estas siaspeca

“sankta libro”. Dediĉu tempon al ĝi, legu, analizu kaj notu viajn ĉefajn interesojn. **Rimarko:** Vi ne havos tempon por ĉio!

- sur la lastaj paĝoj de la KL aperas laŭlanda listo de la kongresanoj. Tie vi trovos utilan rimedon kontakti aliajn ĉeestantojn. Se vi havas apartan intereson renkonti iun, simple notu ties kongresan numeron. Poste, pere de la rendevua tabulo vi povas aranĝi renkontiĝon.
- kubaj kongresanoj estas aparta kategorio, ĉar krom ĝuci la tutan UKon, ni certe devas iom helpi al niaj eksterlandaj gastoj. Vi vidos, ke multaj homoj simple serĉos vin kaj ni ĉiuj devos iomege ĉiĉeroni.

Nu, ĉiuj eblecoj uzi la lingvon estos je nia dispono. Jam nun preparu vin por tiu ĉi unikaĵo.


Honora Komitato de la 75a UK

Alta Protektanto: Carlos Rafael Rodríguez Rodríguez, Vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra Konsilioj de la Kuba Respubliko, **Prezidanto de la Honora Komitato:** Armando Hart Dávalos, Ministro pri Kulturo; **Membroj:** Antonio Esquivel Yedra, Vicprezidanto de la Ministra Konsilio, Isidoro Malmierca Peoli, Ministro pri Eksteraj Rilatoj, Manuel Castillo Rabassa, Ministro pri Komunikado, D-rino Vicentina Antuña Tabío, Prezidantino de la Kuba Unesko-Komisiono, D-ro Fernando Rojas Avalos, Rektoro de la Havana Universitato, D-ro José Antonio Portuondo, Prezidanto de la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj, Abel Prieto, Prezidanto de la Nacia Unuiĝo de Verkis-

toj kaj Artistoj, D-ro Fernando Rojas, Rektoro de la Havana Universitato, Eusebio Leal Spengler, Historiisto de la Urbo, Rafael Sed Pérez, Prezidanto de la Nacia Instituto pri Turismo, Conrado Martínez Corona, Prezidanto de la Nacia Instituto pri Sportoj, Julio García Luis, Prezidanto de la Kuba Unuigo de Ĵurnalistoj, Alberto Juantorena Danger, Vicprezidanto de la Nacia Instituto pri Sportoj, mondfama atleto, Raúl Suárez Ramos, Prezidanto de la Kuba Ekumena Konsilio, Roberto Robaina González, Unua Sekretario de la Unuigo de

precipe eŭropanoj el Norda Eŭropo, estas terurigitaj, eĉ antaŭ ol ekpaŝi en nian landon, ĉar nia somero estas ekterordinare varma kaj ili timas ade sveni tra la kongresaj salonoj kaj dum ekskursoj, manĝoj, ktp. Do, karaj gevizitantoj: tute ne timu, oni mortas nur unufoje! Kaj nia varmego tute ne estas mortiga, eĉ ne por eskimoj (ĉu estas samlingvanoj niaj el tiu gento, mi ne scias?) Kial ne?

Unue, ĉar preskaŭ ĉie kie vi devos sidi dum la semajno estos funkcianta klimatizilo, kiu sentigos vin kvazaŭ vi estus en printempo Nordio. Due, ĉar kiam



Junkomunistoj, Pedro Chávez González, Urbestro de Havano, Enrique Román, Prezidanto de la Kuba Instituto pri Radio kaj Televido, Roberto Fernández Retamar, Prezidanto de la Domo de l-Amerikoj.

La kongreso okazos, somermeze, tamen...

Ne nur la naciajn kongresontojn ni volas adresi ĉi tie, ankaŭ ni dediĉos revueron al la eksterlandaj. Ni certe scias, ke kelkaj,

ne estos klimatizilo estos... akvo! Jes, la plaĝoj, la naĝejoj, la duŝoj kaj la trinkejoj, ĉie vi trovos refreŝigan likvaĵon por via haŭto, pro via gorgo kaj por via animo. Do, tute ne timu kaj alsaltu nian someron preta je ĉiuj plezuroj de l'tropiko.

Rimarko: Ĝis supra alineo mi ŝercis. Serioze mi konsilas al vi ne resti ekster la klimatizitaj ĉambroj de la 10a matene ĝis la 4a vespere, aŭ vi riskos damaĝegan haŭtbruliĝon! La kubanoj scias, demandu al ili!



Radio Havano Kubo ankaŭ kongresas!

Ekde novembro pasintjare la Esperanto-redakcio de Radio Havano proprainiciate alvokis konkurson "75a UK en Havano" kiun kunaŭspicias UEA kaj KEA. Tio konsistigas programeron omaĝe al la kongreso en Kubo kaj la gajninto de tiu konkurso havigos al si senpagan partoprenon en la UK. Aliflanke estas planata renkontiĝo de la redakcianoj kun la geaŭskultantaro dum la kongreso, kio okazos en salono *Miyamoto* la 18an de julio je la 13:00 horo; tiucele Radio Havano pretigas specialan aranĝon. Sed ankoratŭ io povas interesi vin. Ĉu vi deziras havi memorindaĵon pri la UK? Radio Havano Kubo povas ĝin donaci al vi; fakte skribante al Radio Havano Kubo kaj sciligante vian opinion pri la elsendoj aŭ argumentojn pri efikeco de pli ofta elsendado vi ne forgesu peti la poŝtmarkon emisitan de la Kuba Ministerio pri Komunikado omaĝe al la 75a UK, tutcerte vi ĝin havos postrevene.

τ UTC	ν (kHz)	λ (m)	REGIONO
0800-0820	11835	25.35	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1700-1730	15340	19.56	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	15300	19.61	
	15285	19.63	
	11820	25.38	
	11760	25.51	
	11705	25.63	
1830-1900	17800	16.85	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	15285	19.63	
	11800	25.42	
2200-2220	17800	16.85	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	15285	19.63	
2230-2300	11970	25.06	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	11950	25.10	
	11910	25.19	
	6165	48.66	

Jen nia nova tabelo de frekvencoj. Uzu ĝin kaj kio plej gravas, foje leteru al ni. Ne forgesu, ke niaj elsendoj dependas nur de la intereso de aŭskultantoj. Partoprenu mem en niaj programoj, kritiku ilin, proponu... Nia teamo certe reagost Ĝis realdaŭ!

Perkomputila tekstoprilaboro, red. Ilona Koutny. Budapest: Scienca Eldona Centro, 1985. 336 p. Ilust. 22 cm. Dudek unu studoj pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata teks topnilaboro, verki taj de emi nentaj fakuloj; kun ampleksaj bibliografio, biografiaj notoj kaj dek paĝoj de resumoj en la angla kaj rusa. Prezo: 2.00



Naŭ jaroj en la infero; Travivaĵoj de bulgara antifaŝisto. Naŝo Kemalov. El la bulgara trad. Ivan Kovaĉec. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 111 p. 20 cm. Prezo: 1.00.

Ĉu vi konas la teron?; Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj. Endre Dudich. Budapest: Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150 p. (+68 p. da anoncoj). Ilust. 23 cm. Altnivela enkonduko en la geologion, petrolologion kaj sedimentologion,

Profitu, Libroservo atendas viajn mendojn

gion, paleontologion, tektonikon, ter-Internon, terhistorion kaj stratigrafion, apllkajn geofizikon kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion, kun terminaro kaj bibliografio. Prezo: 3.00

Dokumentoj kaj materialoj. La 19a tutsovetia konferenco de KPSU. Raporto, elpaŝo kaj parolo de Generala Sekretario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov. El la rusa trad. L. Novikova k.a. Moskvo: APN, 1988. 142 p. 19 cm. Prezo: 0.50

Geologio Internacia. Div. volumoj, div. aŭtoroj. 21 cm. Fakaĵ artikoloj kun resumoj en la nacilingvoj de la aŭtoroj. Prezo: 1.00

Fokuso. Internacia Komputado, trimonata. Popularscienca serio de Hungara Esperanto-Asocio. Prezo: 2.00

Der Esperantist. (fond. 1965), dumonata, Otto-Nuschke-Strabe 1, DDR-1080 Berlin, Germana Demokratia Respubliko. Red. D-ro Detlev Blanke.

Prezo: 0.15

Poemaro por paco, red. Konisi Gaku, Li Shijun, Miyamoto Masao, Baldur Ragnarsson, Umeda Yosimi. Pekino: UEA, 1986. 44 p. 18 cm. 28 poemoj originale verkitaĵ en Esperanto, elektitaj el 70 kontribuaĵoj por eldonaĵo honora al la Internacia Jaro de la Paco 1986. Prezo: 1.00

Fajrolumo en la fronto, Liu Beĵu (1915-). El la ĉina trad. S. J. Sŭ. Ŝanhaj: Ŝanhaja Esperanto-Ligo, 1950. 148 p. 19 cm. Vigla rakonto pri la revolucia milito en 1948-49 kaj la transiro de la rivero Jangci fare de la Popola Liberiga Armeo, verkita de ĵurnalistoj ĉe la fronto. Prezo: 1.00

Paco. GDR-eldono. Organo de la MEM-Sekcio de GDREA. Movada, politika, kultura. Eld. kaj admin. GDREA. Red. D-ro Detlev Blanke. Prezo: 0.10

Esperanto. Monata. movada, kultura. Oficiala organo de UEA. Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red. Mark Fettes. Prezo: 0.25

Poŝtmarko 1990. Memoriga poŝtmarko pri la 75a UK en Havano. Prezo: 0.30

Insigno. Verda stelo kun litero "E" ene sur blanka mapo de Kubo. Prezo: 1.50

Ŝlosilringo kun ŝildo,

metala, kun la simbolo de KEA kaj dorse la vortoj Kuba Esperanto-Asocio. Prezo: 1.20

Magneto- fona Servo ofertas...

Kantu kaj lernu. Tradiciaj kaj folkloraj kanzonoj tradukitaj el la angla, franca kaj portugala de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso / Brazilia Esperanto-Ligo, 1980. 11 kantoj, en prezento de Joel de Castro, Franca Ferrati k.a.

Plurnacia bukedo, Sylla Chaves. Rio de Janeiro: BEL, 1981. 10 kanzonoj kaj kantoj kaj 8 eroj de instruanta muziko el muzika teatraĵo originale verkita en Esperanto.

La vojo. Kantas Gianfranco Molle. Pizo: La Nuova Frontiera, 1977. Muzika Kulturo 1. Stereofona. 45 min. 15 kantoj originalaj kaj tradukitaj, inter kiuj, "Verda Ĉapo", "Ludoviko", "La Vojo".

Kontakto. Kantas Gianfranco Molle. Pizo: Edistudio, 1979. Stereofona, 45 min. Muzika Kulturo 3. Dek eroj satiraj pri la E-

movado.

Kantu kun Anda. Bydgoszcz. Pola Esperanto-Asocio. Muzika Rondo, 1987. 60 min. 16 kantoj, plejparte verkitaĵoj de Urszula Tupajka kaj kantitaĵoj de la kvarvira ensemblo Anda.

Frandu piron. Johán Valano (ps.) Genevo: LF-koop, 1982. Stereofona, 34 min. Valano interpretas 13 kantojn, inter kiuj troviĝas malnovaj popolmelodioj (rusaj, anglaj, franca, bolivia) kaj kelkaj originalaĵoj. Instrumenta akompano de Gianfranco Molle k.a.

Passport. Joëlle Rabu. Vankuvero: Goldbrush Records, 1987. Kantoj en la angla, la franca kaj Esperanto de la populara artistino.

72a Universala Kongreso - Varsovio. 1987. 90-minuta redaktita kasedo pri la Solena Inaŭguro de la Jubilea kongreso. Paroladoj de H. Tonkin, R. Dobrzynski kaj L. Saleski-Zamenhof, nepo de L. Zamenhof.

Unu mondo, unu lingvo. 1986. 6 kasedoj. Kurso de Esperanto. Luis Jorge Santos-Morales. Bogotá: Centro de Idiomas Winston-Salem.

Esperanto '88. Prelegoj kaj diskutoj de la Internacia Konferenco Esperanto '88 (1988) Havano. Revenas mi. Kantas Jak Le Puil. Pizo: Edistudio, 1982. 10 kanzonoj. Ste-

reofona. Jak Le Puil daurigas siajn temojn, nun kun pli oftaj kasedoj al jen romantikaj, jen "verdecaj" temoj.

Esperanto programita. Hermann Behrmann. Kasedo de la samnoma kurso. Esperanto Centro Paderborn, FRG.

Kubaj kanzonoj I. Kantas Miriam Ramos kaj la konata duopo Maritza kaj Argelio.

Kubaj kanzonoj II. Kantas Julián Hernández kaj Martín Castro.

Speciala soncirkulero. N-roj 1-3. Esperanto Centro Paderborn.

Kiel mendi?

Mendojn adresu al:
Marta E. Alonso Gutiérrez,
Apartado 3034,
10300 Habana.

Sendu al ni vian mendoliston. Ne forgesu indiki la n-ron de via telegrafa giro.

Pri magnetofona servo: Ĝi inkluzivas nur la surbendigon! Ni ne disponas pri kasedoj, vi devas mem alporti vian. Kosto por unu ka sedo estas 2.00. Se ni devas sendi ilin al vi poŝte, tiam la kosto estos 3.00.

Bonvolu taŭge paki vian kasedon se vi sendas ĝin perpoŝte.

KRUCENIGMO

 verkis: **SUNIDO** (Havano)

HORIZONTALE

1. Larvo de papilio. 5. Iri ne paŝante, sed transportate. 10. Glaciŝinta roso. 15. Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo. 16. Figuro limiganta geometrian figuron. 18. Kiel ŝi agis, tial ke ŝi volis havigi tion sia amikino posedas. 21. Vira vesto. 22. Flava juvelŝtono. 24. Infannutrigilo (kons). 25. Ago porti de iu loko al alia. 27. Respekta aŭ gentilia donaco. 28. Homo tro amanta la komforton. 30. Sufikso por indiki parton de numeraloj. 31. Flava metalo. 32. Rondforma ujo por fluaĵoj. 33. Ricevion por uzo dum difinita tempo (r). 36. Konifera arbo. 38. Ova nutra plej interna parto (r). 42. Pene tiri post si. 44. Forigi ŝuldon. 47. Grupo de instrumentoj. 48. Dentoskrapa mamulo. 50. Detala konigo pri okazintaĵo. 52. Prepozicio montranta direkton. 53. Bastoneto por skribi surtabule. 55. Stato de vizaĝo ploranta. 57. Rivereto (kons). 58. Dancu kun Team'1. 59. Permite ronda (vok). 60. Naskiginto de ido (kons). 61. Dudeka litero de greka alfabeto. 63. Fantoma pronomo de la Esperanta gramatiko (inv). 64. Forigi per forta aerfluo. 68. Verdejo meze de la dezerto. 69. Filo (inv). 70. Tre malmola kvarca ŝtono. 71. Okazas komence de kunkusigo. 73. Komence numero. 76. Aroko mallonga. 77. Kolora fluaĵo por skribi. 78. Filido (kons). 80. Sen tempofino. 82. Rektangula (r). 84. Apartenanta al vi kaj al mi samtempe. 85. Avorondo (radikaro). 87. Laŭ la maniero de mezklasulo. 89. Ifo por forlogi ĝenantojn. 91. Aĵo por sidi sur ĉevalo (inv). 92. Harkovrita vertebrulo (radikaro). 94. Pelva osto. 96. Blanko de vizaĝo (inv). 97. Tute ŝirmita kontraŭ infektaj malsanoj. 99. Per partoj de la tuta nombro. 100. Demandvorto loka. 102. Sekvi per okuloj skribitan tekston (r). 103. Longa metala stango sur kiu ruliĝas trajnoj. 105. La plej granda aranĝo Esperantia. 106. Akordo de sinkvaj sonoj. 109. Plej universala sento (inv). 111. Juvelŝtono. 113. Trinko je ies sano aŭ honoro. 115. Apartenanta al la iama rusa imperiestro. 117. Ano de la plej multnombra eŭropa gento (inv). 118. Sufikso montranta kolektivecon. 119. Malkuna, disa. 120. Rifuzadverbo. 121. Dolĝigilo.

VERTIKALE

1. Plektaĵo de fadenoj aŭ snuroj. 2. Delikata, agrablaodoro. 3. Sabla marbordo. 4. Same kiel 68 horiz. 5. Plenda ekkrio. 6. Piulo vivanta en soleco. 7. Kiel ni ĉiuj fine ripozos. 8. En malantaŭa direkto. 9. Komenciliteroj de latinaj vortoj, afiŝitaj sur la katolika kruco. 10. Mezuri pezon (r). 11. Vazo aŭ kesto por enteni tutaj objektojn. 12. Tempo, dum kiu la Tero rondiras la Sunon. 13. Venena substanco eltirata el tabako (kons). 14. Longa aroko. 17. Dudek kvara Esperanta litero. 19. Kotono, premita en molaj tavoloj. 20. Femalulo. 23. Per la memoro, memore. 26. Ĝian verecon oni pruvis per rezonado (radikaro). 28. Spasma kuntirigo de la diafragmo. 29. Vertikale granda. 32. Refleksiva pronomo. 33. Deksesa litero Esperanta. 34. Jompostoma disvolvigo. 35. Komenco de batalado. 36. Same kiel 36 horizontale. 37. Apartenas al la aparolato. 39. Parto de planto entenanta reproduktajn organojn. 40. Difina artikolo. 41. Planto donanta oleoriĉajn semojn. 43. Oficisto leĝe rajtigita por aranĝi diversajn kontraktojn. 44. Prepozicio montranta celon, destinon. 45. Tiel aperas bananoj en la planto. 46. Ŝtono malsupere de la aperturo de pordo. 49. Unua formo de insekto post elovigo. 51. Vegetaĵo, kiu havas grandajn diversformajn kaj diverskolorajn florojn (r). 54. Purigi substancon per iaj procesoj. 56. Tiu, kiu parolas. 60. Lerte sinjeti en alkon por naĝi. 62. Tiu, kiu dividas oniajn religiajn ideojn (radikaro). 65. Vidaĵo, kiu altiras atenton kaj intereson (inv). 66. Antaŭa pinta ekstremaĵo de la buŝo de birdoj (kons). 67. Konforma al nia ideo pri perfekteco. 70. Societo por defendi laboristajn interesojn. 72. Subtenu tiun objekton kaj venu ĉi tien (inv). 74. Ordinara kaj laŭregula. 75. Ne plu prokrastebila. 79. Sidvangoj de homo. 81. Kontraŭa al la komuna saĝo. 83. Tio, pri kio oni parolas. 85. Plej universala sento. 86. Granda blanka bonodorfloro, simbolo de pureco. 88. Unu el la formoj de fizika energio, montriĝas per lumaj, varmaj kaj mekanikaj radioj. 90. Du Romianumero: 93. Sola (r). 95. Densa aromigita sukera solvaĵo (r). 98. Rifuzo. 101. Azi-devena ludo, tre satata de multaj esperantistoj. 107. Sufikso montranta malgrandecon. 108. Apartenas al besto aŭ al objekto. 110. Tradicia fabela rakonto pri antikvaj dioj (r). 112. Estinta Esperanto-organizaĵo el Sovetio. 114. Sufikso indikanta grupigon (inv). 116. Prefikso por montri ripetadon.

Ĉu timo?
EKI

1	2		3	4	5	6	7		8	9	10		11	12	13	14
15		16		17				18		19	20		21			
22		23			24			25				26				
27				28			29						30			
	31			32							33					34
35			36					37			38		39	40	41	
42			43			44		45		46		47				
	48					49		50		51					52	
53	54			55			56		57			58				
59				60			61		62						63	
	64	65		66			67		68						69	
70						71		72				73	74	75		76
77				78	79		80				81		82		83	
84				85			86			87						88
		89	90						91			92				93
94	95				96				97			98			99	
100				101				102				103			104	105
106			107	108			109	110				111				112
113					114				115		116			117		
118				119						120			121			

“Esperanto estas natura reago ne nur kontraŭ la materiaj, sed pli vere kontraŭ la spiritaj baroj lingvaj inter la popoloj”

Edmond Privat (1889-1962)

kontaktojn serĉas...

Pollando

Darko Uziebio; Wilkowo
82516 Trumieje, Pollan-
do

Nowirka Ela. Polska ul.
Niepodległości 74; 62-
415 Pyzdry Pollando.

Bożena Golonka; ul. L.
Wenedy 11-27; 30-833
Krakoj, Pollando.

Stefania Gatner; ul.
Grottgera 36/8, 44-100
Gliwice; Pollando

Eva k. Ceslavo Pietras-
zewscy (geedzoj); Lesz-
czany; 22-114 Zmudz,
Pollando.

Jakub Krzmarczyk; ul.
Orloaskiego 74/9, 32-600
Oswiecim, Pollando.

Barbara Wyporska; ul.
Norwida 3; 42-310 Zarki,
Polando.

Ivona Ilaczor; ul. Za-
wadzkiego 22/129, 43-
100 Tychy, Pollando.

Hanna Kozłarek; Pana
Tadeusza 17 m 92; 10-
460 Olsztyn, Pollando.
dez.kor. pri sporto k.
junuloj.

Marian Zdankowski;
Pana Tadeusza 15/69;
PL-10-461 Olsztyn, Pol-
lando.

Zbigniew Wozniak;
Mycow 8/1; PL-22-543
Chłopotyn; Woj-Zamosc,
Pollando.

Brazilo

Pekin Tenorio Vaz;
Caixa Postal, 3250;
69001-Manaus-Am;

Brazilo.

GDR

Manfred Scholz, Georg-
Weerth-Str. 8; Jena-DDR-
6900, GDR.

Sovetunio

Aleksandr Kovaljov;
SU-686410, per Majslij 2-
6, Omsukcan, Maga-
danskaja obl. URSS, So-
vetunio.

J. Suvajev; Valentina,
Ludmila, Tanja, Larisa,
Natasa, Irena, Svetana,
Olga; URSS, 626440, Nij-
nevartovsk, Atr. 60 Let
Oktyabrja 6-135. Sove-
tunio.

FRG

Johannes Windisch;
Krahenburgstr. 31, D-
7700 Singen-18, FRG.

Benino

Membroj Klubo "La verda
stelo"; adreso: B.P. 06-
1855 Cotonou, Benino.
Prez: Edouard Dossou;
29 j. Gen.Sekr: A. Char-
les Jerome; 21 j. Kasisto:
Pierre Sovide; 32 j.,
Camille Sossou; 28 j.,
Philippe Houssou; 29 j.,
Alexis Houhouanou; 45
j., Privas Tchikpe; 27 j.,
Gilles Sossa, Gilbert
Noumorvi, Antonin
Moussouvikpo.

AVANCKONKURSO

Ĝojige ni sciigas al vi, ke
tridek naŭ mil ducent sesdek
naŭ leteroj atingis la redak-
tejon de Avanco responde al
Avanckonkurso. La skipanoj
devis labori sencese dum
tridek kelke da tagoj nur por
malfermi, ordigi, legi kaj ar-
hivi tiom egan letermonton.
Kaj kion ni trovis je la fino, ...
ke bedaŭrinde neniu el ili
dónis la taŭgan responduj.
Nu, la demando ankoraŭ
validos, sed mi donos kon-
sileton al miaj karaj gelegan-
toj: Ĉu vi jam tralegis tiujn
numerojn de revuo Esperanto
aĉeteblaj ĉe la oficejo de
KEA, precipe tiujn de la ok-
dekaj jaroj?

Nu, liropremiojn vi ricevos
nun se vi respondas korekte
la duan demandon de 1990,
antank al aperos la venonta
numero. Sed se vi ne sukcesas
dum tiu tempo, tute ne
gravas, ĉar por tiuj, kiuj sendos
plej multajn korektajn
respondojn dum la jaro, la
redakcio preĝigos surprizan
omagon iam ĉe la jarfino.

Demandoj n-ro 2/1990

Teoristoj kaj movadscio-
logoj estonte klarigos la kial-
on kiu kaŭzis tiun abundon
de pseŭdonimoj / pseŭdono-
moj / kaŝnomoj / plumnomoj
inter verkemuloj / verkistoj
tra la centjara historio de nia
lingvo.

Listigu dek trijn inventaĵojn,
kompreneble aldonante la
veran nomon de la koncer-
nalo

Ĉu facile? Tute certe jes. En-
manigu al vi Enciklopedion
de Esperanto, Esperantan
Antologion kaj similajn, kaj
kvinminute vi kolektos la lis-
ton

Sendu la respondon al:
Avanckonkurso
p.f. 2018, 10200 Havano,
KUBO